Raporto laŭ la punkto 7.3.7. de la Statuto:

# Raporto de AGEI, Landa Sekcio de ILEI por 2025

**Nomo kaj mallongigo en Esperanto:** Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj / AGEI

**Nomo kaj mallongigo nacilingve:** Verband Deutscher Esperanto-Lehrer e.V., / VDEL

**Jaro de fondo / Jaro de aliĝo al ILEI:** 1968, nova statuto, nova registriĝo: 2006

**Jura statuso:** jes (registrita asocio ĉe juĝejo en Hannover, Registergericht, 04.07.2006)

**Rilato kun Landa Asocio de UEA:** jes sendependa faka asocio de GEA

**Rilato kun Landa Asocio de TEJO:**

ne oficiale, praktike en informinterŝanĝo, reciproka partopreno en eventoj

**Membro-nombro en 2025:** 54 40 paperaj, 7 retaj, 1 HM, +3 familianoj kun sama adreso, kiuj ne pagas plenan membrokotizon kaj ne ricevas IPR de ILEI, do la landa listo enhavas 54 membrojn.

**Rajtigitaj komitatanoj por 2025:** 4
Zsófia Kóródy
Dr. Rudolf Fischer
Christof Krick
Martin Ptasinski

**Retejoj kaj kontaktiloj sekciaj:**

Oficiala hejmpaĝo: jes
Oficiala ret-adreso: http://esperanto.de/agei

Ĉu via sekcio havas retgrupon: jes

**Revuo sekcia:**

jes, porokaza cirkulero, ĉ. 2-3 foje jare

**Enlanda membrokotizo:** jes

**Nuna estraro de la sekcio:**

Zsófia Kóródy, prezidanto
Dr. Rudolf Fischer, vicprezidanto
Christof Krick, kasisto
Martin Ptasinski, estrarano

=== ***agado*** ===

**Propraj aranĝoj dum 2025:**

**1. La jarĉefkunveno de AGEI** tradicie okazas dum la Germana Esperanto-Kongreso. En 2025 GEK okazis en Schleiden-Gemünd (kombinita germana-beneluksa Esperanto-kongreso.

La AGEI kunsido dum GEK estas malfermita evento, do povas allogi pli vastan publikon kaj esti forumo por detala informado pri instruagadoj. AGEI-prezidanto Zsófia Kóródy gvidis la kunsidon, informis pri kursoj, instruado de Esperanto, klerigado de Esperanto-instruistoj kaj kursofertoj en Germanio kaj ankaŭ de la Esperanto-Centro Herzberg.

**2. TORPEDo 20** (10-12 oktobro 2025) la Tradicia Oktobra Renkontiĝo PEDagogia okazis – kiel ĉiujare - en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo, organizita de AGEI, la Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj kaj de la Filio de GEA por Klerigado kaj Kulturo en Esperanto-Centro Herzberg. La ĉijara evento okazis en hibrida formo: krom ĉeestaj partoprenantoj en ĉiu tago estis 1-2 virtualaj sesioj anoncitaj al la membraro per la AGEI-korespondlisto kaj informante pri ili per eventaservo.org, ebligante tiel publikan ĉeeston internaciskale per Zoom sub gvido de Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar, spertaj lingvistoj kaj lingvoinstruistoj.

La ĉefcelo de tiu tradicia evento estas oferti fakan spertiĝon kaj spertinterŝanĝon pri lingvoinstruado kaj specife pri Esperanto-instruado, ebligi traktadon de ĝenerale uzataj kaj uzeblaj instrumetodoj, informado pri en- kaj eksterlandaj fakaj eventoj, interesaĵoj, sciindaĵoj el la Esperanto-movado.

Jen la programo kun la temaro:

<u>Sesio 1</u>: 10 oktobro, 19:30-21:00 Lernmaterialoj por Esperanto-instruado, tradiciaj kaj modernaj lernolibroj, instruhelpiloj, didaktikaj ludoj
<u>Sesio 2</u>: 11 oktobro, 10:00-11:30 Esperanto-kursoj ĉeestaj kaj retaj, klubkunvenoj kun lingvolernado, lingvoekzercado, klerigofertoj, instruado al diversaj aĝ- kaj celgrupoj
<u>Sesio 3</u>: 11 oktobro, 16:00-17:30 Informado, varbado, alvokoj al Esperanto-kursoj, niveloj, postularo de Esperanto-ekzamenoj, preparmaterialoj por sukcesa trapaso, taŭgaj evento-ofertoj al komencantoj, progresintoj, movada trejnado, instrukapabligo
<u>Sesio 4</u>: 12 oktobro, 11:00-12:30 Retkursoj, vortaroj, ekzercoj, facilaj legaĵoj, film(et)oj, ŝercoj, anekdotoj, lernforumoj, ktp.
Tiu reta kontakteblo gravas por tiuj, kiuj pro sia aĝo, aŭ longa distanco, eventuale pro malsano, ne povas ĉeesti la eventon, sed povas tiel akiri novajn sciojn, informojn pri instrusperto kaj instrurilataj movadaj eventoj, povas virtuale diskutadi pri fakaj temoj: gramatiko kaj metodiko, literaturo, movada organizado kaj informado.

**Aranĝoj de aliaj kie la sekcio aperis:**

1. En majo 2025 kunvenis la reprezentantoj de landaj ligoj kaj fakaj asocioj de Germana Esperanto-Asocio (GEA) en Herzberg am Harz. La aktivuloj el diversaj regionoj el Germanio raportis pri la lokaj agadoj, reprezentiĝis ankaŭ GEJ kaj la fakaj asocioj de GEA. Peter Zilvar partoprenis tie nome de AGEI.

2. La dekan fojon estis organizita somera intensa Esperanto-kursaro (Semajnoj de Esperanto-Perfektigo - SEP) en kunlaboro kun Esperanto-Centro Herzberg. Ĝi estis dusemajna kaj internacia. La intensan instruadon helpas krom la regulaj instruhoroj ankaŭ komunaj aktivaĵoj kun daŭra

lingvouzado ekz. dum preparado kaj konsumado de manĝaĵoj, posttagmezaj ekskursoj al la regiono, kulturaj programeroj, vizitoj al muzeoj, uzado de la Esperanto-biblioteko, ktp. Al la programo apartenis ankaŭ muziko, kantado, rakontado, prelegoj kaj prezentadoj. La partoprenantoj havis la eblon renkontiĝi, paroladi ankaŭ kun lokaj klubanoj.

La pli spertaj kaj kuraĝaj partoprenantoj povis spertiĝi ankaŭ pri instruado, kontribui al la lecionoj aŭ mem gvidi parton de ili, doni taskojn al la kursanoj. Ili ĝojis ricevi la ŝancon fariĝi por mallonga tempo kursgvidantoj kun la faka helpo far Zsófia Kóródy.

**Propraj projektoj dum 2025:**

Daŭras la kunlaboro inter AGEI kaj Interkultura Centro Herzberg (sub gvido de Peter Zilvar) respektive kun la t.n. Landa Plenkreskula Kleriginstitucio (Ländliche Erwachsenenbildung, LEB https://www.leb-niedersachsen.de). En tiu organiza kadro jam de 10 jaroj okazadas tutjara kurs- kaj klerigprogramo kun variaj temoj, prelegoj, prezentadoj. De 2021 ĝi estas en virtuala formo, en la regulaj mardvesperaj "Buntaj Vesperoj", kies programo kun la aktuala ĉeftemo estas anoncita ĉe Facebook kaj ĉe http://eventaservo.org. La agnosko far LEB estas grava atingaĵo, kiu ebligas montri la kulturperantan, edukan rolon de la internacia lingvo Esperanto.

**Projektoj de aliaj en kiuj la sekcio kunlaboris:**

Ni ofertas per la paĝaro de AGEI http://agei.esperanto-urbo.de/page.php?pid=83839799 la informmaterialon de la projekto de ILEI „1 leciono pri Esperanto". Ĝi estas havebla tie en pluraj lingvoj. Ĝin oni atingas ankaŭ sub la maldekstra menupunkto Biblioteko.

Ni subtenas ankaŭ la edukorganizaĵon edukado.net (http://edukado.net), kiu kolektas kaj disponigas sur sia hejmpaĝo informojn pri Esperanto-kursoj, ebligas diskutforumon, prezentadon de lernolibroj kaj grandan virtualan arkivon de instruhelpiloj, didaktikaj materialoj.

Ni instigas nian membraron kaj alvokas ĉiujn gekolegojn registri siajn kursojn kaj detalojn pri la instruado ĉe tiu komuna registrejo, do AGEI ne mem listigas Esperanto-kursojn en Germanio.

**Varba agado en Esperanto kaj naciaj lingvoj:**

1. VHS (Volkshochschule – Popola Altlernejo):

Ni eluzas la bonan varbeblon pri Esperanto per kursofertoj aperigataj en la programkajeroj de germanaj Popolaltlernejoj (VHS), kiuj atingas vastan publikon. Ankaŭ en 2025 ni alvokis gekolegojn oferti siajn lokajn kursojn ĉe VHS en la koncerna regiono kaj utiligi iliajn senkostan servon. Estas bona tendenco, ke ĉiujare kelkaj lokaj kluboj, instruantoj ofertas Esperanto-kursojn tie. Eĉ se poste iu kurso ne realiĝas pro manko de sufiĉaj aliĝantoj, tamen la legantoj de tiuj programkajeroj estas informitaj pri Esperanto kaj ekscias pri la uzeblo de nia internacia lingvo.

2. Per la paĝaro https://www.bildungsurlaub.de:

Vastan varbadon ni faris tie per la anonco pri nia somera intensa lingvokurso 21-25.07.2025 - "Esperanto grezenlos" (Esperanto senlime). La kurso de Esperanto-Centro kaj AGEI en Herzberg am Harz (8 lecionoj x 5 tagoj), ricevis oficialan agnoskon kiel klerigcela feriumado de la koncernaj instancoj en Malsupra Saksio (Niedesachsen) sub la kodo NBildUG, Nr.: 1213/103545- por komencantoj kaj progresemuloj- por lerni gravajn gramatikajn strukturojn- por akiri taŭgan vortprovizon

3. LEB – Ländliche Erwachsenenbildung (regiona plenkreskula edukado):
Dank' al bona kunlaboro de Esperanto-Centro Herzberg kun tiu institucio la Esperanto-kursofertoj aperas sur ilia retpaĝaro:
https://goettingen.leb-niedersachsen.de/kurse-ansicht.html?nr=N-G%C3%96601953&sp=5&th=61

4. Gazetoj, sociaj platformoj:
Alvokoj, AGEI-novaĵoj aperadas en la gazeto de GEA Esperanto aktuell, dissendiĝas per dissendolistoj, retpaĝoj, Facebook, ktp. Instigo al membriĝo okazas dum grandaj Esperanto-renkontiĝoj, kongresoj enlandaj, dum studsesioj de Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg.

**Sekciaj kontaktoj kun ne-esperantistaj organizoj kaj projektoj:**

Ni ricevis informon ankaŭ de aliaj kolegoj, kiuj pli aŭ malpli regule kunlaboras kun lokaj popolaltlernejoj (Volkshochschule-VHS). En kelkaj urboj ankaŭ en 2025 aperis anoncoj kaj eĉ okazis Esperanto-lingvokursoj, kunvenoj.

Por plua helpo de organizado de tiaj kursoj AGEI subtenas gekolegojn per kolektado kaj modelcela aperigo de varbtekstoj por VHS-kajeroj. Tiujn tekstojn oni povas trovi sur la retpaĝaro de AGEI: http://agei.esperanto-urbo.de/page.php?pid=97868652

**Konata E-instruado en via teritorio, praktike en kiom da lernejoj/universitatoj estas kursoj de Esperanto kaj kiom da kursoj ĉeestaj aŭ retaj okazas en via lando?:**

Esperanto-instruado en lernejoj estas bedaŭrinde tre malofta. Pluraj aktivaj lernejaj instruistoj pensiuliĝis, junaj gekolegoj ne aktivas en lernejoj. Des pli estis ĝojige, ke Zsófia Kóródy ricevis inviton por prezenti la ekeston kaj historion de Esperanto al gimnazianoj en la 7a kaj 8a klasoj en Groß Ilsede dum t.n. projekttago en junio. Temoj: Kiel ekestis Esperanto? Kia lingvo ĝi estas? Kiel ĝi funkcias en la mondo? Kiel kaj kial oni lernu ĝin? Kiujn travivaĵojn oni povas havi per Esperanto?

Kelkaj lokaj kaj regionaj Esperanto-kluboj regule kunvenadas, ofertas lingvolernadon, babilrondojn kaj perfektigon, ekz. en Berlin, Hamburg, Frankfurt, Stuttgart, Münster, Hameln, Hamm.

Bonsukcesaj estas ankaŭ la retaj kursoj, kiujn gvidis Heinz Sprick surbaze de la lernmaterialo de lernu.net kaj la kursoj de Dr. Rudolf Fischer (Esperanto en dialogo, propra, ampleksa lernmaterialo).

Estas ĝojiga la regula kursoferto de GEJ ekz. dum GEK, la t.n. KEKSO (Kreema Esperanto-Kurso) por komencantoj, kun laborrondoj kaj feriotempaj ofertoj.

Informoj pri Esperanto-lernado aperas sur la paĝaro de GEA: https://www.esperanto.de/de/lernen
Kursofertoj, ktp. estas troveblaj ĉe: https://www.esperanto.de/de/enhavo/lerni/kurse-vor-ort

**Aliaj agadoj en 2025:**

Ni daŭre kunagas kun Germana Esperanto-Centro (Filio de GEA por Klerigado kaj Kulturo) por la ordigado, pliriĉigo de la Biblioteko en Herzberg am Harz, kie okazas tutjara programo, multaj kunvenoj, kursoj kaj klerigseminarioj, do la biblioteko servas publikan intereson. Ofte estas serĉataj tie literaturaj verkoj, lernolibroj, vortaroj, instruhelpiloj kaj metodikaj libroj.

La pedagogia, metodika fakkolektaĵo estas specialaĵo de tiu biblioteko. Ĝi estas je dispono por partoprenantoj de la klerigseminarioj, metodikaj kursoj kaj verkantoj de faklaboraĵoj.